

# Markola Kongreso

Oostende, 26-an, 27-an kaj 28-an de septembro 1997.

## Programo:

**vendredo** *de la 14.00 ĝis la 20.00 h* akcepto de la partoprenantoj ĉe la firmao Witdoeckt, Wittenonnenstraat 9A (angulo Kerkstraat), proksime al Wapenplein.

**26-9-1997:**

**20.00 h** konatiga vespero en „De Noordzee”, Wapenplein 14.

**sabato** **10.30 h.** oficiala akcepto en la urbodomo

**27-9-1997:**

**11.45 h.** busa ekskurso + vizitoj en la regiono: Koeke-lare (Käthe Kollwitz-muzeo, k.a.), Vladslo („La Afliktitaj Gepatroj”, kortuŝa kontraŭmilita verko de Käthe Kollwitz, sur germana militista tombejo de la unua mondmilito, per tiu vizito ni faros repacigan geston; estu ĝi la simbolo de nia kongreso), Diksmuide (kies historia urbocentro releviĝis el la ruinoj post la milito 1914-1918). – Je tagmezo estas antaŭvidita malpeza manĝaĵo, kies prezo estas enkalkulita en la aliĝkotizo.

**19.00 h.** restoracio Benny, Vlaanderenstraat 13 (angulo Langesstraat): ĝenerala asembleo por la FEL-membroj.

**20.00 h.** vespera festeno (ĝi estos la ununura organizita manĝo – por la aliaj manĝoj estas ĉiaj eblecoj en nia turisma urbo). La festmenuo konsistos – laŭ via prefero – el fiŝaj, viandaj aŭ vegetaraj pladoj.

**dimanĉo** **10.00 h.** meso en la dekana preĝejo SS Petro kaj Paŭlo, parte en la nederlanda, parte en Esperanto; aŭ Feest- en Cultuurpaleis, Wapenplein, nereligia kunveno.

**28-9-1997:**

**11.00 h.** depende de la vetero kaj laŭ via deziro: gvidata urba promenado aŭ vizito al muzeoj.

**15.00 h.** Feestpaleis, ferma kunsido en kiu la loka koruso „Tonadiores”, sub la direktado de S-ino Aimée Thonon aŭdigos kantprogramon. Surpriza prezentado de nia kuba amiko.

FINO: proksimume je la 17.00 h.

**Agrablan restadon en Oostende deziras al vi la „Konkanoj”!**

## Kial Koekelare?

Unue ĉar tiu ĉi Markola Kongreso rilatas al Eŭregio, regiono en kiu komunaj interesoj de najbarlandoj povas esti prizorgataj laŭ eŭropaj normoj. La origina celo de la iniciatinto de la Markolaj Kongresoj estis kunigi la esperantistojn en la markolaj havenoj por praktiki la lingvon kaj amikiĝi. Por ni ankaŭ la ĉirkaŭaĵo de Oostende, valoras esti malfermita por la partoprenantoj. Ni do ne restas en la urbo kaj vizitas parton de Okcidenta Flandrio, la „okcidentan angulon”.

Koekelare estas dinamisma kamparana komunumo, kiu travivis veran ŝanĝon al urbeto kun 8000 enloĝantoj. La nomo Koekelare origine estis „Cockelaere”, kiu signifas „vendisto”, laŭ unua fonto. Alia fonto diras ke „laere/lare/laar” estas „hela, libera loko en arbaro”, kaj „cocke” signifas „pli alta tero”. Historie kaj geografie la dua teorie estas pli akceptinda.

Antaŭ 25 jaroj ekestis problemo de senhomigo, multaj enloĝantoj transloĝiĝis al proksimaj urboj. Por haltigi tiun fenomenon la komunuma estraro komencis projekton por revalorigi la vilaĝan kernon: konstruado de socialaj (malpli multekostaj) domoj; de nova kvartalo en iu, kun integriĝa celo, estas domoj kaj por junaj familioj kaj maljunuloj; malnova loĝkvartalo estis renovigita kun ŝtata subvencio; komerca centro enhavanta 17 apartamentojn kaj 10 vendejojn, igas la vilaĝan kernon pli alloga; la antaŭa bierfarejo renoviĝis kaj estas nun la kultura centro kun biblioteko, tri muzeoj kaj restoracio.

Ni vizitos la Käthe Kollwitz-muzeon en la „turo” de la bierfarejo. (Vidu la apartan gvidilon.)

La restoracio „Hertog van Arenberg” (Duko de Arenberg): la nomo memorigas ke la germandevena nobela familio Arenberg loĝis en Koekelare ĝis post la fino de la dua mondmilito. La fasado datiĝas de 1632. La domo havas riĉan historion, i.a. ĝi iam eĉ estis policejo kun mallibereja ĉelo en la kelo.

Nuntempe eniru senprobleme: ne necesas esti duko por senti sin kiel hejme.

La malpeza lunĉo kiun oni prezentos al vi konsistas el

– buterpano kun ŝinketo kaj origina „Dudel”-biero el Koekelare

(vi rajtas mendi alian trinkaĵon, se vi ne ŝatas bieron);  
– torto „Sankta Martino” kun kafo aŭ teo.  
Miriga konstruaĵo estas la „Sala Thai”, orienta kuriozaĵo kiu atestas la amikecajn rilatojn de kelkaj el la lokaj gravuloj kun Tajlando.  
Ne forgesu rigardi al la poldera pejzaĝo dum la busveturado tra nia „ebena lando”.

### ***Miloj da soldatoj***

*Se iam en via vivo vi en la okcidenta angulo preterpasas  
sub pluvo kaj nordaj ventoj  
la tempo turniĝas kiam vi preterpasas ĉi tie  
la militon vi retrovos.*

*Jes estas la milito kiun ĉi tie vi retrovos  
kaj la tombo de miloj da soldatoj  
ĉiam ies patro ĉiam ies infano  
nun mortsilentaj kaj de dio forlasitaj.*

*La arboj silentu nun kaj la herbo nenion rakontu  
kaj ankaŭ la vento ne kantu  
pri via senutila morto  
estis troega teruro*

*Jes estas la milito kiun vi retrovos ĉi tie  
kaj la tombo de miloj da soldatoj  
ĉiam ies patro ĉiam ies infano  
miloj kaj miloj da soldatoj  
miloj kaj miloj da soldatoj  
miloj kaj miloj da soldatoj*

laŭ Willem Vermandere  
flandra kanzonisto  
tradukis: Raymond Wylleman

# Vizito de Käthe Kollwitz-turo

## Koekelare [kukelare]

La ĉi-tiea kolekto da gravuraĵoj de Käthe Kollwitz estas apartigita en 3 lokoj de la iama maltoturo (= la maltejo de la antaŭa bierfarejo; malto = ĝerminta sekigita greno, ordinare hordeo, uzata por fabriki bieron; la maltoturo estis parto de la bierfarejo, nun loka kulturejo).

La kolekto estas ordigita laŭ 9 temoj, A ĝis I.

- |          |                                   |
|----------|-----------------------------------|
| Salono 3 | I. La kampilara milito            |
|          | H. La milito                      |
|          | G. Sociala emocio                 |
|          | F. La ribelo de l' teksistoj      |
| Salono 2 | E. Membroportretoj                |
|          | D. La morto                       |
|          | C. La virino – patrino kaj infano |
|          | B. La komencaj jaroj              |
| Salono 1 | A. La afliktitaj gepatroj         |

### **Temo A: *La afliktitaj gepatroj***

Peter Kollwitz, 18-jara germana volontulo, batalpereis ĉe Diskmuide, en oktobro 1914.

La patrino, Käthe Kollwitz, intencis starigi tombejan monumenton memore al li sur la monteto Schildhorn, proksime al Berlino, sed post vizito al la tombo de Peter en 1926, kune kun sia edzo, ŝi decidis meti ĝin en Flandrio, kie li batalmortis.

La interna batalo ĉe Käthe Kollwitz pri la plej taŭga formo de ŝia skulptaĵo daŭris dek ok jarojn, same longe kiel vivis Peter. Tiu ĉi lukto en la koro kaj la menso de la artistino-patrino kortuŝe estas priskribita en la libreto „*La Afliktitaj Gepatroj – Käthe Kollwitz en Flandrio*” nederlandlingve verkita de Raf Seys, enloĝanto de Koekelare, kaj

esperantigita de Raymond Wylleman, la prezidanto de La Konko. (Prezo: 250,- BEF).

La „patro” kaj la „patrino” havas la vizaĝon de la propraj gepatroj Kollwitz, esprimantaj profundan ĉagrenon kaj samtempe plendantaj kontraŭ la milito.

Sur la militista tombejo en Vladslo la ŝtoniĝinta ĉagreno de la „Aflikitaj Gepatroj” certe imponos al vi.

### **Temo B: *Komencaj jaroj***

Ekde sia frua juneco, Käthe Kollwitz, sur arta kampo interesiĝis pri la laboristoj kiujn ŝi renkontis en la stratoj de la urbo kaj ĉe la haveno. Por ŝi laboristoj estis belaj. Pure estetika afero, ankoraŭ neniu sociala emocio. „La burĝaro ne allogis min... sed la proletaro estis tute en la centro.”

Sufiĉe frue ŝi spertis ke la grafiko estis por ŝi la sekvenda vojo. Nigra-blanka arto ege taŭgas por kritiki sociajn malbonstatojn kaj batali kontraŭ ili.

La desegnaĵoj de tiu ĉi serio ankoraŭ ne montras profundan simpatian kaj kompaton je la laboristoj. Ili nur pritraktas la laboristan klason en ĝia karakteriza aspekto en la urbo (B1), en la drinkejoj (B2,...)

### **Temo C: *La virino – patrino kaj infano***

En la arto de Käthe Kollwitz la virino ludas pli grandan rolon ol la viro:

- aktiva virino instiganta la viron al batalo (Temoj F kaj I)
- suferanta virino (Temo H)
- valoriganta la virinajn rajtojn (C1 kaj C2)

La centra temo en ŝia verkaro estas „La patrino” – la virino kiu amas, naskas infanojn, deziras teni, perdas kaj suferas. Käthe cetere tre intense travivis la patrinecon, kun momentoj de granda feliĉo, sed ankaŭ de profunda doloro. La perdo de ŝia filo Peter en la unua mondmilito kaj ŝia nepo en la dua, ege grave trafis ŝin. Multfoje patrinoj sur ŝiaj verkoj estas memportretoj.

Esprimoj de tiuj sentoj oni retrovas interalie en: „Bonvenigo” (C3) Sceno disradianta simplecon kaj feliĉon post la naskiĝo de la unua filo Hans.

„Graveda virino” (C4) esperplene atendas la novan vivon.

„Patrino feliĉo” (C5) signo de amo kaj alligeco.

„La Patrino” (C6) protektas siajn infanojn kontraŭ la danĝeroj de la mondo. La virino sur la antaŭa plano, ĉirkaŭbrakanta siajn du infanojn, estas Käthe Kollwitz kun Hans kaj Peter.

„Grensemoj ne estu muelitaj al faruno” (C7) maljunulino volas ŝirmi siajn infanojn kontraŭ nova milito (40-44). La diraĵo estas de Goethe, la preferata poeto de Käthe.

„Virino kun la ĝemeloj” (C8) inspirita patrineco. Tiu ĉi skulptaĵo nun staras sur la Käthe Kollwitz-placo en Berlino, sur la loko de la iama domo de la familio Kollwitz (detruita dum la dua mondmilito).

Nazi-Germanio ne ŝatis la bildon de „la patrino” far Käthe Kollwitz. Germana patrino devis esti sana, ĉiam kontenta, senproblema, naskanta estontajn soldatojn. Ĉe la potenctranspreno en 1933 la nazioj devigis Käthe eksiĝi el la Prusa Akademio kaj ili malpermesis al ŝi ekspozicii.

### **Temo D: *La morto***

Dum sia tuta vivo Käthe Kollwitz okupiĝis pri la morto. En sia komenca periodo ŝi preferis desegni malsanajn kaj mortantajn homojn. Krom la multaj deprimoj en ŝia vivo, la morto de Peter puŝis ŝin esprimi ĉi tiun temon.

En ŝia verkaro la morto havas multajn vizaĝojn:

- timiga, kiam ĝi atakas infanojn (D1) aŭ kiam ĝi ektiras ilin el la patrinaj brakoj (D2);
- amika, kiam ĝi invitas akompani ĝin (D3).

La memportreto (D4), farita je la fino de ŝia vivo, montras ŝian sintenon fronte al ŝia propra morto, kiun ŝi atendas sinrege kaj sentime.

### **Temo E: *Memporetroj***

Käthe Kollwitz desegnis pli ol cent memportretojn. Ili respondas al la demando „Kiu mi estas?”:

- necerta juna virino (E1)
- memfida virino (E2)
- turmentita virino (E3), 1920
- maljunega virino (E4), 1938

### **Temo F: *La ribelo de la teksistoj***

La teatraĵo „La ribelo de l' teksistoj” de Gerhart Hauptman, en 1893, rakontas la ribelon de 1844 de la sileziaj teksistoj kontraŭ la ekspluatado far la fabrikistoj. La prusa armeo terenbatis la ribelon.

La prezentado ege tuŝis Käthe, kiu pri la temo faris ses gravuraĵojn, kiuj montras la suferadon de la subpremantoj, ne la batalon kontraŭ la subpremantoj. La verkoj alvokas al kompato kaj solidareco kun la sorto de la proletoj. Ili ankaŭ montras la senpovecon de la batalo.

F1 – la mizero:

F2 – la morto:

F3 – la konsiliĝo: Kion fari?

F4 – la ekiro, neorganizita, de la teksistoj

F5 – la kuratako, la sturmo

En F4 kaj F5 la patrino kun infano estas en la centro.

F6 – La fino: la mortintoj estas enportitaj en la laborejon. Malespero kaj senpovo regas ĉe la virinoj. La batalo estis vana.

### **Temo G: *Sociale emocio***

La 13-an de junio 1891 Käthe (Schmidt) edziniĝis kun Karl Kollwitz, kuracisto kiu dediĉis sin al la malriĉuloj. En Berlino ŝi ekkonis la mizeran vivon de liaj pacientoj: senlaboreco aŭ tro longaj labortagoj por bagatela pago, la virinoj ĉiam gravedaj, malsano, alkoholismo, prostituo.

Pro tiuj spertoj ŝia pura estetika intereso ŝanĝiĝis al profunda sento de simpatio kaj kompato kun la laborista klaso: G1 ĝis G7.

G8 – „Vieno mortas! Savu ĝiajn infanojn!” afiŝo

G9 – „Helpu Rusion!” afiŝo alvokanta helpi la enloĝantojn de la Wolga-regiono, kie regis nutraĵmanko pro ega sekeco.

G10 – lignogravuraĵo, la mortolito de la pentristo Karl Liebknecht, ekstrema maldekstrulo, kiu estis murdita de oficiroj de la registara armeo, kune kun Rosa Luxemburg, en 1919. Käthe respektis la ideojn de Liebknecht, sed ne liajn rimedojn por realigi ilin. Ŝi kontraŭis la perforton.

### **Temo H: *La milito***

Post la morto de sia filo Peter, en la komenco de la Unua Mondmilito, ŝi esprimis sian ĉagrenon per serio, kiu montras la militon kiel fonton de mizero:

H1 – „La ofero”

H2 – „La volontuloj” Peter ankaŭ propravole soldatiĝis.

H3 – „La gepatroj” (mankas)

H4 – „Vidvino I”

H5 – „Vidvino II”

H6 – „La patrinoj”

H7 – „La popolo” En la centro staras la virino, kiel molkora patrino, ne kiel batalanta aŭ suferanta virino. Ŝi estas ĉirkaŭata de viroj, kiujn la milito markis fizike kaj psike por ĉiam.

En ĉi tiu serio Käthe Kollwitz ne montras la batalon, ankaŭ la malamikoj ne videblas. Ŝi lumigas la postrestantojn, la virinon, la patrinojn kaj sian propran ĉagrenon.

La pacifistino cetere daŭre avertis kontraŭ la senceco de la milito: per afiŝoj

H8 – „La postvivantoj – Faru militon kontraŭ la milito!”

H9 – „Neniam plu milito!”

## **Temo I: „La kampulara milito”**

Tiu serio rakontas la kampularan militon en 1525 kontraŭ la urba kaj eklezia povoj kaj la nobelaro. La kampuloj volas liberigi sin el siaj malhomaj vivcirkonstancoj, sekve de la altaj impostoj. Fonto estas la libro pri tiu temo de la germana historiisto Zimmerman, eldonita en 1844. La serio da gravuraĵoj ekestis en la tempo de la oktobra revolucio de 1905 en Rusio. La klasbatalo tiam regis ankaŭ en Germanio, kaj Käthe Kollwitz sin montris „la artistinon de la revolucio” per ĉi tiu verko.

I1 – „La plugistoj” La patro kaj la filo mem tiras la plugilon.

I2 – „Perfortita” simbolo de la senrajteco de la kampuloj.

I3 – „Akrigi la falĉilon” esprimas la preparon de la ribelo.

I4 – „Al la armiloj.”

I5 – „La eksplodo” (mankas)

I6 – „La batalkampo” virino serĉas, lanternon en la mano, sian mortan filon.

I7 – „La malliberuloj” La vizaĝo montras malesperon. Vana estis la batalo. Peter, la filo de Käthe, estis la modelo por la knabo sur la antaŭa plano.

***Kara vizitanto, ĉu vi rigardis la kolekton en la maniero kiel Käthe Kollwitz iam diris: „Venu kaj ne nur rigardu al mi, sed tra mi”? Tiam vi komprenos ŝian mesaĝon. Transdonu ĝin.***